
nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2024

## JAM EBLAS ALIĜI AL LA ESPERANTO-KURSOJ EN LA UNIVERSITATO UNED

Jam malfermiĝis la aliĝperiodo por la kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), en ĝiaj du niveloj A2 (por komencantoj) kaj B1. Eblas aliĝi ĝis la 22a de oktobro, kaj la kurso komenciĝos en novembro.




Estas tre grave diskonigi la kurson, unue pro la kvalito de la instruado, sed ankaŭ ĉar ĝi estas tre bona ŝanco por atingi oficialan rekonon de la kono de la lingvo, kaj ĉar de la sukceso de la enskribiĝo dependas la rekunvoko en sinsekvaj jaroj.

Ni memorigas ke la anoj de Hispana Esperanto-Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo. Krome, Madrida-Esperanto Liceo planas stipendii lernontojn; interesitoj kontaktu kun la adreso: madrid@esperanto.es.

Ankaŭ eblas aliĝi el landoj el Ameriko kaj Eŭropo kie la Universitato havas sidejojn. Por la nivelo B1 eĉ ne necesas koni la hispanan, ĉar la instruado okazas rekte en Esperanto.

Vidu pli: https://www.esperanto.es/nueva-edicion-de-los-cursos-de-esperanto-en-la-uned/.

## EKSPOZICIO KAJ KURSO EN LA GRANJA

La segovia asocio de Esperanto komencas sian aktivadon per ekspozicio kaj kurso pri Esperanto en la Casa de Cultura de La Granja de San Ildefonso, ekde la 1a de oktobro. La ekspozicio daŭros ĝis la 14a de oktobro, matene kaj vespere. La kurso okazos la mardojn vespere, ĝis decembro, en la sama sidejo, komencante per la baza nivelo.







La organizanto kaj instruisto estas nia amiko David Trigo. Pliajn informojn petu al segovia@esperanto.es. La formularo por enskribiĝo troviĝas en la adreso: https://forms.gle/ijSBboHThtKEZye5A.

Krome ni informas pri alia kurso okazonta ekde la 1a de oktobro en la Universitato de Leono, kiun gvidos Pako Balibrea. Pliajn informojn legu en la retejo de la Universitato ĉe: https://www.unileon.es/noticias/la-universidad-de-leon-imparte-un-curso-sobre-la-lengua-universal-el-esperanto.

Bonvolu diskonigi ambaŭ kursojn inter viaj konatoj en tiuj kaj proksimaj urboj.

Tiumaniere komenciĝas kvazaŭ jaro de Esperanto en Kastilio kaj Leono. Ni memorigas ke en majo 2025 okazos en tiuregiona urbo Sorio la 83-a Hispana Kongreso de Esperanto. Oni jam komencis la pretigadon de la evento, kaj tre baldaŭ aperos en la reto la unuaj informoj kaj la aliĝilo. Estu atentaj al la adreso https://kongreso.esperanto.es/.

## VIZITIS NIN

Pluraj vizitoj de eksterlandaj esperantistoj okazis en septembro, kaj krome oni anoncis la venon de aliaj por studi tie ĉi dum tiu ĉi jaro (Benjamin el Ĉinio, Adam el Pollando…).

La 1an de septembro kelkaj homoj rendevuis la en Dubajo loĝanta brazila samideano Julio Calegari. Ankaŭ vizitis nin la kolombia amiko Iván Santacruz, survoje el eŭropaj aranĝoj. La 26an renkontis nin José Antonio Vergara el Ĉilio, post vizito al pluraj urboj el Hispanio.





## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

Ni denove renkontiĝos ĉiujn lundojn en la sidejo, ekde la 18,30 horo.

La 21an de oktobro ni renkontiĝos tie kun itala samideano Viviana, kiu jam en aliaj okazoj vizitis nin.

La sabata renkontiĝo okazos la 5an de oktobro, je la 18,30 horo, en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

## PLIAJ INFORMOJ KAJ KONTAKTOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter* aŭ *X*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com